

Trompita



*

Kiel povis ĉi tio okazi al mi?

Antaŭ ne longe mi trovis ĉe YouTube filmon pri prezentado de fama kanto de Freddy Mercury.

Sub la video-fenestro estis skribite:

'I Want to Break Free' (Queen) Performed In North Korea

Very rare footage of the North Korean girl group 'Moranbong Band' and The North Korean Military Chorus.

La Esperanta titolo certe estus ,Mi volas liberiĝi'.
Ĉu vere ĝi estas prezentita en Norda Koreio?

La dua frazo klarigas tion:

Tre rara filmajo de la Nordkorea knabingrupo "Moranbong Band" kaj La Nordkorea Armea koruso.

Mi miris ke io tia ekzistas en Norda Koreio. La Moranbong-bandon mi jam vidis iam. Tiu virina bando estas tre fama en Norda Koreio. Sed ke ili prezentas nun eĉ faman pop-kanton en la angla lingvo, tio estas surprizo.

Mi eĉ pli miris pro la vira koruso, kiu staris en la malantaŭo. Tie kolektiĝis certe pli ol cent soldatoj, plejparte maljunuloj. Ili portis la tipajn militistajn ĉapojn, kiuj aspektas tiel kiel ni konas el Ruslando. Kaj krome estis tie ankaŭ la orkestro kun blovinstrumentoj kaj violonoj. Ĉio estis vere tre impresa.

La filmo komenciĝas per turniĝo de la kamerao al la salutantaj soldatoj kaj al la giganta flago de Norda Koreio. Kompreneble ankaŭ Kim, Jon-un, la Prezidanto de la Ŝtataj Aferoj-Komisiono de la KDPR (Korea Demokratia Popola Respubliko), aperas sur la granda ekrano. Li estas ankoraŭ la ĉefa komandanto de la nordkoreana polpola armeo. Li sidas meze de la publiko kune kun sia edzino.

Post koncertsimila enkonduko, la ses blanke vestitaj Moranbong-virinoj komencas kanti: "Dud, dud, k.t.p."

Tiam oni vidas la soldatoj de la koruso malfermante siajn buŝojn vaste kaj nun aŭdiĝas la longdaŭra "Ah". Intertempe oni kelkfoje vidas gitaron en granda bildo. Kaj tiam manklakas la unua vico de la spektantoj laŭ la takto. Multaj de ili portas multajn medalojn sur la brusto.

Ankaŭ Kim, Jon-un manklakas. La kamerao movas tra la publiko kaj montras kelkajn spektantojn per granda bildo. Oni povas vidi la movojn de la buŝoj. Evidentiĝas ke ili laŭte kunkantas. La homoj eĉ kantas "God knows" (Dio scias)!

En la malantaŭo prezentiĝas granda ekrano montrante la sunon sub la nuboj. Tiam subite aperas en grandega formato a bildo la prezidanto vestita per nigra, longa mantelo, kiu flirtas tien kaj reen en la vento. Je la fino de tiu sceno Kim afable ridetas.

La kantado estas tute en la angla lingvo. La muzika prezentado vere aŭdiĝas bone.

Jes, mi estis impresita, tiel ke mi devis informi ankaŭ aliajn pri tiu muzika evento.

La ekrano de mia komputilo montris ankaŭ bildojn de aliaj videoj je la maldekstra flanko. Mi estis nun tre scivolema kaj klakis sur la bildo pri infana koruso el Norda Koreio.

Mi legis:

„Rammstein's Mutter Performed by North Korean Children's Choir.“

Tio signifas ke temas pri la kanto ‚Mutter‘ (Patrino) de la germana pop-bando Rammstein.

Ĉu tio povas esti la vero? Unue oni vidis kelkajn knabojn kun mallongaj hararoj kaj ruĝaj koltukoj. Ili prezentis ruĝajn flagojn kaj blovis trombonojn.

Poste montriĝis granda koruso kun knabinoj. La prezidanto Kim denove sidi en la publiko kun ĉifoje ĉefe junaj gastoj vestitaj per blankaj ĉemizoj kaj ruĝaj koltukoj.

La piano akompanis la koruson, kiu komencis kanti en la germana lingvo. La muzika prezentado denove estis bona.

Kaj mia entuziasmo nur malfortiĝis, kiam mia filo klarigis ĉion profunde.

„Ha, ha! Vi estis trompita! Ĉio estas nur falsa!“

Mi estis konsternita. Mi devis lerni, ke iu, kiu sin nomas Lars von Retriever, estas fama pro tiaj videoj. Li miksas muzikon de iu origina fonto kun bildoj, kiujn li prenas de tute alia filmo. Tiel li ekzemple prenis la kantadon de rusa infankoruso kaj enmetis ĝin en la filmon de infankoruso el Norda Koreio.

Nun, post tiu klarigo mi pli atentigas la lipmovojn de la kantistoj kaj rimarkas, ke ne ĉio estas sinkronigita.

Sed, respekto! La falsaĵoj estas vere bone faritaj!

La informoj de la YouTube-kanalo jam klarigas tion:

„Important note: this is a comedy channel so don't take my videos too seriously, please.“

Grava indiko: Tio estas komedia kanalo, tial ne prenu miajn videojn tro serioze, mi petas.

Klaus Friese, 2024